**Ĉu Gazao estas nova kaj grandega "geto de Varsovio" ?**

Verkita de D-ro *Éric Bernard COFFINET*
ebcoffinet.fr

Kiu deklaras esti ano de popolo "elektita", kompreneble supera al la aliaj, tiun mi nomas "suprematisto".

Kiu deklaras tiun "elektitecon" denaska pro geedziĝo nur inter "elektitoj" por konservi ĝin, tiun mi nomas "rasisto".

Kiu deklaras sian rajton akapari la bienojn de aliaj homoj "ne elektitaj", tiun mi nomas "koloniisto".

Kaj neevitebla rezulto de koloniado estas malnobligo, malhumanigo kaj laŭvorte "brutigo" tiel de la kolonianto kiel de la koloniato.

La teruristoj de Ĥamaso dum la 7a de oktobro 2023 malnobliĝis ĝis la nivelo de la judaj teruristoj de Irguno kaj Lehio, kiuj buĉadis la vilaĝanojn de *Deir Yassin* (Der Jasin) je la 9a de aprilo 1948. Ĉar oni vidis ĉefojn de tiu teruristaj grupoj poste fariĝi ĉefoj de la Israela Ŝtato, eble ni iam vidos ĉefojn de Ĥamaso fariĝi ĉefoj de Palestina Ŝtato. Ĉu teruristoj aŭ rezitantoj ? Tion juĝos la Historio ... verkota de la venkontoj kiel kutime !

Ĉiuj tiuj krimoj estas faritaj je la nomo de la plej noblaj idealoj, kiel religio, evidenta destino, libereco, independeco, amo al patrolando, pravige necesa sindefendo … kaj oni konstatas, ke la pasintaj persekutitoj fariĝas la nunaj persekutantoj. Mi tute ne konsideras, ke mortigi per bomboj milojn da infanoj kaj ankoraŭ pli da civiluloj estu pravigita sindefendado. Ne ! Laŭ mia opinio estas nur "etna purigado" de Gazao, kiel tio okazis en la geto de Varsovio, por plivastigi la "vivnecesan spacon" de tiuj "elektitoj" (Ĉu de Nilo ĝis Eŭfrato? Ĉu por estonte kontrui la kanalon *Ben Gourion* inter la Akaba golfo kaj la Mediteranea maro aù por akapari la apudaj gaso-kampoj submaraj?).

Eble iuj taksos tiun komparon mian misrilata, troiga, falsa aŭ tute maldeca.
Nu rememoru !

En la ĉefurbo de Pollando okupita de la germana armeo, 400000 judaj homoj estis amasigataj en la geto de Varsovio, tre malgranda je 300 hektoaroj teritorio ĉirkaŭita per altaj muroj kun pikdratoj. Escepte de la eminentuloj de la *Judenrat* (juda konsilantaro) kaj de iliaj fihelpantoj, ili vivis kaj mortis en mizerego, malliberigitaj kaj ekspluatitaj. Finfine eksplodis ribelo kontraŭ la subpremintoj je la 19a de aprilo 1943. Post sovaĝa batalo dum unu monato la naziaj militistoj kaj policanoj tute detruis per fero kaj fajro la geton, kaj deportadis la postvivantojn al koncentrejoj.

Ĉu vi ne ankoraŭ vidas la rilaton ?
Neniu estas pli blinda ol tiu rifuzanta vidi …

Oni nuntempe celebras la judan feston de Ĥanuka, la feston de la lumoj, kiu festas gravan venkon militan de Makabeo kaj simbolas la spiritan rezistadon de Judujo kontraŭ la helenismo. Iom de lumo ekbrilu en koroj kaj mensoj por ke oni rezistu al malbonaj kaj malbenaj fortoj de suprematismo, rasismo kaj koloniismo, por ke Gazao ne fariĝu nova kaj grandega "geto de Varsovio" !